epopean poemon „Václav z Michalovic“ kaj en 1888 „Nové písně“ (Novaj kantoj). Pro lia poemo verkita je honoro de 200-jara datreveno de Calderon-naskiĝo, donis al li hispana akadamio oran medalon. Ankaŭ en beletristiko li montriĝis tre produktema. Li estas aŭtoro de multaj volumoj da rakontoj, versajoj kaj humorajoj: de romano „Kandidát nesmrtelnosti“, „Kresby z cest“ (Vojaĝaj pentrajoj), „Upomínky z Východu“ (Rememoroj el oriento) satiro „Ekskurso de sinjoro Brouček sur la lunon“ (1888), „Aventurplenaj vojaĝoj tra Bohemujo“ k. t. p. Estas tute neebla taksi per kelke da vortoj neordinaran genion de nia poeto, kies verkoj fariĝis jam dum lia vivo „klasikaj“. Lia politika kredo ĉiam vivos en liaj poemoj en kiuj li instigis sian nacion al persisteco en batalo por forprenitaj idealoj de ĉiu vera Bohemo, kie ankaŭ kun entuziasma protesto li kontraŭstaras al ĉia subpremado, malpraveco kaj perforto. Liaj majestaj „Písně otroka“ (Kantoj de sklavo) mem sufiĉas, por ke Svatopluk Čech estu nomita nia plej nacia kaj unu el plej gloraj poetoj.

Rosa.

PROPONOJ.

Ju pli multaj homoj traktas pri unu kaj la sama afero, des pli diversajn opinion kaj juĝon oni aŭdas pri ĝi. La saman procedon ni vidas jam inter nia bohema esperantistaro, kiu, ne estante ankoraŭ tiel nombroriĉa kiel tiu en Francujo aŭ Anglujo, tamen produktis jam mirinde grandan nombron da proponoj bonegaj, bonaj, iom bonaj, iomete bonaj, preskaŭ bonaj, nebonaj kaj fine — malbonaj. Tiuj lastaj ne estas plejparte malbonaj pro sia interna ideo, ne, la cirkonstancoj, kiuj malpermesas nun ilian alradikigon kaj kreskadon, ilin faras nematuraj — do, por nuna tempo antaŭtempaj kaj vanaj.

Ni legis kelke da demandoj pri tiu aŭ alia afero en formo de proponoj, nerekte aŭ kelkafoje rekte adresataj al ni kun atentigo, ke „graveco de nia propagando kaj sukceso de pluaj laboroj dependas de t u j a efektivigo de tia projekto“. Feliĉe la aŭtoroj ne ofendiĝas, kiam ni klarigas la kaŭzojn, k i a l ilia projekto, tiel interesa, kaj post kelkaj jaroj (aŭ pli frue eble) ĝustatempe uzebla, nun estas kaj restos deziro lulata en ilia memoro, atendanta sian ŝavonton. Ne seninterese estas kompari la stilon de leteroj, per kiuj oni rekomendas sian proponon, t. e. observi, ĝis kiu punkto, ĝis kiu grado volas la aŭtoroj mem subteni sian proponon, helpi ĝian efektivigon, k u n l a b o r i kaj havi a n k a ŭ la okazon esti kiel kunlaborantoj kritikotaj. Kun multe pli da fido je sukceso oni rigardas verkadon gvidatan (aŭ subtenatan) de ĝia inicia-

tinto*, ol laboron de personoj fremdaj al ideo super kiu ili klopodas. Neniu societo, neniu redakcio, neniu korporacio de Esperantistoj povus kontentigi ĉiujn proponantojn, p r e c i p e n e t i a m, kiam ili deziras, ke ilia ideo nepre kaj tuj efektiviĝu per laboro de nomitaj, sed, ke ili mem restos nenomitaj observantoj, neniel kunhelpantoj, sed tiun rajton ili rezervas certe, pli malfrue — kritikantoj. En tiaj okazoj kaj sub tiaj kondiĉoj neniu prenos sur sin la respondecon pri tio, ĉu la afero atingis tiun celon, pri kiu sonĝis — anonima iniciatinto. Kiam ideo estas bona, nun plenumebla, ĉiu helpos laŭpove aŭtoron, kiu sin konigas postulante kunlaborantojn kaj kiu almenaŭ per sia konsilo promesas subteni s i a n ideon, sed tiu, kiu sin detenas en antaŭo de ĉia eĉ la plej malgranda kunhelpo ne tiom pro manko da tempo kiom pro timo, ke lia nomo estus konigita, tiu ne gajnos sufiĉe da fidemuloj, kiuj zorgus pri ideo forlasita. E n t i a j o k a z o j oni ne nomus aŭtoron „modesta anonimulo“, sed oni simple dirus: li mem ne kredas eblan sukceson kaj kaŝas sin, restante kontrolema inspektoro.

De tiu, kiu deziras konigi per nia gazeto sian projekton aŭ proponon, ni atendas, ke li unue sin subskribos kaj due, ke li promesos subtenadi a l m e n a ŭ p e r k o n s i l o efektivigon de sia ideo. Kiam li ne submetiĝos je ĉi tiuj kondiĉoj, li ne koleru, ke ni mem-ne adoptas ĉiam lian opinion kaj ke lia (eble tre bona) ideo ne estas t u j aplikata. Konsideru ĉiu, kiu deziras esti aŭdata, ke ni, bohemaj Esperantistoj, ne estas milionuloj, kaj ke ĝis nun Esperanto bezonas pli multe nin, propagandistojn, ol n i bezonas Esperanton.

Esperanto — slava lingvo. En la pasinta jaro 1907 traflugis la boheman gazetaron nelonga raporto, ke iu profesoro moravia**) okupiĝas per la ideo krei helpan lingvon interslavan, kiu, el slavlingvaj elementoj konstruita, prezentus al la slava nacio simplan kaj facilan rimedon por interkompreno.

Jen la slava Esperanto por la Slavoj!

Estas certe nedisputeble, ke, se tiu ĉi ideo efektiviĝus, ĝi alportus al la slava mondo tiujn nesupozitajn profitojn, kiujn al la t u t a mondo promesas Esperanto. Sed ĉu kaj kiam la dirita ideo trovos sian Zamenhofon, kaj eĉ se ĝi trovos lin, ĉu ĝi ne farus la aferon nur pli komplikita, lasante la Slavojn plue devigataj alpreni flanke de tiu ĉi lingvo ankoraŭ lingvon tutmondan?

Mi do opinias, ke estus pli simple kaj utile uzi por tiu celo Esperanton kaj tiel per unu fojo solvi ambaŭ problemojn. Pri tio, ĉu ĝi taŭgas ludi ĉi tiun rolon, nenia dubo ekzistas: cui licet plus, licet utique et minus (kiu povas pli, povas certe ankaŭ malpli).

---

*) i n i c i a t i — dáti podnět, popud, začíti (srov. z lat.: iniciativa - popud, iniciálka - ozdobné začáteční písmeno).

**) Prof. Ignác Hošek en Kroměříž: Grammatik der neuslavischen Sprache 1907. Prezo 2 K (rim. de red.).

Kiom helpus Esperanto la idean unuiĝon kaj fratiĝon de slavaj popoloj!

Estas dolĉe por la homo sonĝi pri ne malproksima esperreble tempo, kiam ĉiuj kleraj diversnacianoj interrilatos laŭbezone per Esperanto, fratoj sin sentante. Sed nekompareble pli dolĉe por la Slavo estus vidi iun tagon, kiel ĉiuj slavaj nacioj, ĝis kiom komprenebl̂e naciaj lingvoj ne sufiĉas al ili — en paco per unu lingvo, nenium ofendanta, interrilatas ĉu societe aŭ science, ĉu komerce aŭ industrie, ne uzante por tiu ĉi celo lingvon plej fremdan. Mi vidas ekzemple Slavon de proksima estonteco: Li legas. En manoj li tenas ian revuon, ĉiuslavan revuon enhavantan originalajn artikolojn de diversnaciaj plej eminentaj aŭtoroj slavaj, verkitajn kun apuda, laŭvorta, preciza traduko esperanta, farita de verkinta mem. Tian artikolon legas en originalo nacianoj, en kies lingvo ĝi estas skribita, la ceteraj Slavoj laŭeble ankaŭ en originala, se ne, en esperanta traduko, kaj la *tuta* fremdlando pro graveco de l' revuo devigata etendi je ĝi la manojn instruiĝas pri la slava vivado per *unu* traduko.

Kiel facile kaj simple oni povus informadi la tutmondan publikon pri persekutado de Slovakoj, Poloj k. t. p., kiel sukcesus ĉiuslavaj kongresoj!

Sed superflue estus priskribi ĉiujn profitojn liverotajn al ni, Slavoj de Esperanto.

Kion do fari? Propagandi inter Slavoj Esperanton. Ĉu ni tion ne faras? Demandos ĉiuj slavaj propagandistoj. Mi respondas Jes, amikoj, dankon kaj honoron pro tio al Vi!

Sed ni duobligu nian fervoron, kaj propagandadu ankoraŭ pli intense kaj celkonscie antaŭ ĉio sekvante la devizon: *Esperanto por la Slavoj!*

Alproksimiĝu do unue ni, Esperantistoj-Slavoj ĉu izolitaj ĉu en societoj grupiĝintaj, interligante fratajn rilatojn, kaj kreu ni grandan tutslavmondan ligon por propagandi Esperanton precipe inter tiuj slavaj nacioj, kiuj rilate Esperanton dormas dormon de justuloj!

Ni fondu ĉiuslavan gazeton naci-esperantan!

Ni kongresadu ĉiujare! Jam nunjare ni povus kunveni okaze de nia IVa kongreso por pli disvolvi la demandon kaj pridiskuti rimedojn, kiel plej sukcese propagandi, kiel pri slavaj aferoj-suferoj fremdlandon efike informadi, kaj nelastavice kiel kunfratiĝadi kaj fortikigi niajn, nun ankoraŭ nesufiĉajn rilatojn.

Kaj la lasta celo? Idea unuiĝo de ĉiuj Slavoj. (Mi certe ne bezonas aparte akcentigi kaj ripetadi, ke oni pensas nur idean, ne politikan unuiĝon.) Sed se iu el Vi, fratoj, trovos tiun ĉi ideon — cetere ne novan — tro fantazia, forjetu sekve ankaŭ esperantismon, la noblan Zamenhofan idealon, kiu havas ja la saman celon, aplikatan de mi nur al slavaj rilatoj.

Vivu Esperanto — slava ligilo.*)

P—ka.

---

*) En kelkaj gazetoj esperantaj aperis avizo, ke komencos eliradi nova gazeto „Slava Revuo". Post personaj informoj ni sciigas, ke la projekto de tiu ĉi revuo restos por nuna tempo ne ankoraŭ efektivigita.

Similan proponon ni ricevis jam je fino de pasinta jaro de s-o Dr. Szczepan Mikołajski (Lwów, ul. Śniadeckich 6), kiu diras en sia letero interalie: „En estonta jaro estos malfermita en Praha ekspozicio, kiu esperebla altiros multajn gastojn el slavnaciaj landoj. Tiu ĉi okazo ŝajnas al mi prospera por arangi kunvenon de Esperantistoj slavaj kaj trakti pri la demando. Mi ne dubas, ke ĉiuj kluboj esperantistaj slavlandaj elsendos delegitojn kaj ke pruviĝos, kiel facile povas interkompreniĝi, Bohemoj, Poloj, Kroatoj, Slovenoj, Serboj, Rutenoj, Slovakoj kaj Rusoj per Esperanto." Li proponas plue eldonadon de slava revuo, kiu konigadus samtempe la slavajn naciojn en fremdlando.

Al tiuj ĉi proponoj ni aldonas, ke ŝajnas al ni rekomendinda kunvoki slavan kongreson d u m n u n a j a r o, ĉar, versimile, pli malfrue ne estos la tutmonda kongreso tiel proksima al slavaj landoj kiel nun (1909 Hispanujo?) Ĉu Praha taŭgus por tiu rolo pli bone, ni ne povas diri, sed ni opinias, ke ne ĉiuj slavnaciaj kongresontoj veturos el Dresden viziti nian jubilean ekspozicion en Praha, kie cetere estas jam pli multe ol 20 aliaj grandaj kongresoj por tiu tempo anoncitaj.

Specialan eldonejon kaj librejon esperantan proponas s-o J. L. Bruin en Haag (Kepplerstraat 170) en Holando. La entrepreno, estante komuna al tutmonda esperantistaro, celus eldonadon de m a l k a r a j verkoj esperantaj kaj estus direktata de komitato elektota inter ĉiuj interesuloj. Bezona kapitalo estus kolektita per eldono de akcioj po 25 kaj 100 hol. fl. Mono de akciuloj ĉiam profitigus al ili 5% el sumo nun pagita. Laŭ proksimumaj kalkuloj unu duono de profito estus uzita por la propagando de Esperanto, alia duono por kovri elspezojn. Sidejo de tuta entrepreno estus Haag. Pli detalajn informojn sendos suprenomita sinjoro.

Neŭtrala teritorio Moresnet inter Germanujo, Belgujo kaj Holando, kun urbo Altenberg estas rekomendata de prof. Gustave Roy (Collège de Saint-Girons, Ariège, France) kiel neŭtrala ŝtato esperantista, amikejo de ĉiuj trapasantaj vojaĝantoj kaj sidejo de internacia komerco. La ŝtato mezuranta ses kv. kilometrojn kuŝas proksime de urboj Aachen, Liège kaj Verviers, najbare de ĉefaj linioj eŭropaj, kaj havas 3500 diversnaciajn loĝantojn. Interesa franca broŝuro pri tiu ĉi projekto eliris antaŭ nelonge kaj estas ricevebla ĉe aŭtoro por 60 ctm. afr. Projet réalisable en six mois d' un État espérantiste indépendent.

Organizado de internaciaj vojaĝoj. Profesoro Houssais (Bourges, Cher, France) faras jenan tre interesan proponon: Esperantistoj, kiuj dezirus viziti niajn tutmondajn kongresojn, ofte ne povas pro malproksimeco aŭ pro netaŭga libertempo entrepreni tiun ĉi vojaĝon. Al tiuj li proponas formi post interkonsento kun Esperantistoj najbaraj malgrandajn grupojn, kiuj, kondukataj de unu aŭ du enlanduloj, vizitus f r e m d a j n samideanojn. Ili povus ĝui tiel ankaŭ la plezuron uzi en praktika vivo Esperanton parolatan; niaj postkongresaj ekskursoj montris jam al ni, kiel bela kaj gaja estas la opa vojaĝado de diversnaciaj Esperantistoj. S-o Houssais plezure donas al ĉiu pli detalajn klarigojn.

KRONIKA.

Ve všech zemích, v každém téměř městě jest již Esperanto známo. Zprávy o jeho propagaci v cizině, přinášené v národních časopisech esperantských, omezují se v prve řadě na vyčítání pořádaných přednášek, zahájených kursů, výstav a pod. Byla-li před několika lety přednáška o Esperantu navštívena stem posluchačů, zaznamenaly všechny naše listy tento fakt jako významnou událost; dnes není zvláštností účast několika set posluchačů nebo návštěvníků kursu. Žádný náš časopis nemůže vyhraditi dostatek místa všem zprávám o těchto potěšitelných novinkách; tím méně možno uspokojiti čtenáře, který hledal by v některém národním časopise p o d r o b n ě j š í zprávy o hnutí v zemi jiné. Koho zajímá věděti přesně, kdy a v kterých městech, na příklad v Anglii, pořádány byly přednášky o Esperantu, které anglické listy přinesly významné články a pod., toho uspokojí pouze tamější časopis národní — The British Esperantist, nebo ochotný dopisovatel, s nímž byl navázal přátelské styky.

Aby pak tato kronika sama nestala se jednotvárnou, uznáváme za vhodno rozšířiti její obsah výtahy ze zajímavějších článků ostatních 50 dnes vydávaných časopisů esperantských, pokud články ty svým obsahem mohou naše čtenáře zajímati a hlavně — pokud místo dovolí.

Pro přehlednost podáváme seznam našich časopisů, o nějž, mimochodem řečeno, byli jsme v poslední době několikráte požádáni (abychom ušetřili místa, budeme v příštích číslech užívati zkratek uvedených v závorkách). F r a n c i e: Lingvo Internacia (L. I.), La Revuo (La R.), Tra la Mondo (T. l. M.), Espero Pacifista (E. Pacif.), Espero Katolika (E. Katol.), Internacia Socia Revuo (I. Soc. R.), Laboro (Lab.), Esperanta Ligilo (E. L.), Juna Esperantisto (Ju. E.), Unuiĝo de l' Bibliofiloj (U. B.), L' Espérantiste (L' E.), Paris-Esperanto (Pa. E.), L' Etoile Espérantiste (L' E. E.), Tra Parizo (Tra P.); A n g l i e: The British Esperantist (The B. E.), La Esperanta Instruisto (La E. I.); N ě m e c k o: Germana Esperantisto (G. E.), Eho Esperantista (E. E.), Saksa Esperantisto (Sa. E.), Germana Esperanto-Gazeto (G. E. G.); A m e r i k a: The American Esperanto Journal (The A. E. J.), L' Amerika Esperantisto (L' A. E.), Verda Stelo (V. S.), Antaŭen Esperantistoj (Ant. E.), Ĉilo Esperantista (Ĉi. E.), Brazila Revuo Esperantista (B. R. E.); Š v ý c a r y: Internacia Scienca Revuo (I. Sc. R.), Svisa Espero (Sv. E.), Flugila Stelo (Fl. S.), Esperanto Journal (E. J.), B u l h a r s k o: Bulgara Esperantisto (B. E.), Lumo (Lu.). R ů z n é: F i l i p i n a Esperantisto (Fi. E.), A m s t e r d a m a Pioniro (Ams. P.), Esperantisten (š v e d s k ý; En.), E s t l a n d a Esperantisto (Est. E.), F i n n a Esperantisto (Fin. E.), D a n a Esperantisto (D. E.), J a p a n a Esperantisto (Ja. E.), La Verda Standardo (m a ď a r s k ý; La V. S.), P o l a Esperantisto (P. E.), R u s l a n d a Esperantisto (R. E.), Stelo K a t a l u n a (St. K.), Tutmonda Espero (T. E.), Suno H i s p a n a (Su. H.), A f r i k a Esperantisto (Af. E.), Voĉo de Kuracistoj (V. de K.), R u-

mená Gazeto Esperantista (R. G. E.), Roma Esperantisto (R. E.), Časopis Českých Esperantistů (Č. Č. E.).

NĚMECKO. IV. kongres Esperantistů, od něhož dělí nás pouze doba pěti měsíců, poutá vždy více a více pozornosti ke klubu drážďanskému, který oznamuje nám svými oběžníky postup prací spojených s přípravami našeho sjezdu. Klub založený v Drážďanech 1. listopadu 1906 čítá již přes sto pracovníků, kteří činně pomáhají čtyřčlennému výboru, pořádají kursy (též otevřen byl kurs pro 25 strážníků, kterým přidělena úloha informování cizích návštěvníků v městě), sbírají materiál pro výstavku atd. Po sjezdu německých Esperantistů v Drážďanech dne 8. května min. roku byla výstavka literatury esp., pořádaná při oné příležitosti, darována státní bibliothece a stala se základem nového oddělení (yf), které dnes obsahuje sto svazků. — Do konce února přihlásilo se na 500 účastníků kongresu a ohlášeno přes 30 odborových schůzí. Dle zpráv výboru se dovídáme, že súčastní se kongresu též dr. Zamenhof. Hlavní hromadné schůze budou pouze dvě: zahajovací a závěrečná. V poslední době vyšla vkusná ill. esperantská brošura o letním sídle Esperantistů „Weisser Hirsch" nedaleko Drážďan: knížku lze dostati zdarma u předsedy přípravného výboru Dr. Schramma (Ständehaus) po zaslání jednoho mezinárodního kuponu (Coupon-Réponse International) 25 pf. Nálepky reklamní budou vydány v dubnu. (Konkursu súčastnilo se 140 prací žáků umělecko-průmyslové školy drážďanské.) Současně vyjde ročenka svazu německých Esperantistů (cena K 1·20) obsahující průvodce po Drážďanech. — Učitelská jednota drážďanská připravuje schůzi učitelstva. Esperantista grupo en Hanaŭ a. M. sestavuje okružní výstavku po vzoru výstavky českého svazu: Bohema Unio Esperantista.

KRONIKO NACIA. Ĉefa okazintajo, kiu promesas movigi kaj antaŭen puŝi la propagandon en niaj landoj estas la eldono de Ŝlosiloj kaj Tutoj bohemaj. Tuj post ilia apero ricevis la centra asocio „Unio" mendon je mil ekzempleroj kaj ĉiutage centoj estas dissendataj al novaj kaj novaj aĉetantoj. Ĉiu societo devas posedi provizon de ĉi tiuj propagandiloj! Neniu eliru el sia hejmo, ne havante la libretojn en la poŝo! — Esperantista Klubo en **Praha** baldaŭ finigos siajn du kursojn en kiuj instruas ĝia sekretario s-o Davídek. El du cent personoj, kiuj partoprenis la unuan lecionon, duono alvenadas regule. La klubo havis la 5-an februaron ĝeneralan kunvenon, kiu reelektis senŝanĝe la komitaton nomitan de la novembra eksterordinara kunveno. El raportoj de ĝiaj membroj ni ĉerpas: La klubo havis en lasta jaro 125 pagintajn membrojn kaj ĝiaj spezoj atingis preskaŭ mil kronojn; 980 leteroj estis dissenditaj. Por la biblioteko oni aĉetis dum lasta monato librojn: Konkordanco de ekzercaro (n-o 263). Naŭlingva etimologia leksikono de la lingvo Esperanto (264). Esperantista kantaro (265). Nova konsulo de klubo estas nomita en Sarajevo (s-o Jar. Schwarz, adjunkto de ŝtata fervojo). — En komerca akademio de Praha estis farita tre bona propagando por nia ideo per taŭge elektita

temo de angla konversacia parolado: s-o Boh. Davídek, frato de nia sekretario, vekis intereson inter siaj kunlernantoj per sia traktado pri Esperanto. — Rondeto studenta estas fondita de s-o K. Kuthan. En kristana societo de junuloj instruas s-o Ježek kaj f-ino Řandova en Praha kaj s-o Hoehmann en Plzeň. — Ankaŭ la esperantista Klubo en **Plzeň** havis du ĝeneralajn kunvenojn en tiu ĉi jaro: eksterordinaran (24-an januaron) kaj regulan la 21-an marton. En la unua, kiun partoprenis ankaŭ reprezentantoj de Unio kaj de klubo en Praha, oni akceptis proponon pri ŝanĝo de regularo kaj pri starigo de memstara klubo esperantista (ĝis tiu tempo ĝi estis filio de klubo en Praha). La nova regularo estis jam aprobita. Per klopodoj de la klubo estis malfermita la 19-an februaron kurso esperanta en la komerca akademio: instruas s-o St. Balik dufoje en la semajno; 28 lernantoj sekvas la kurson. — En **Hradec Králové** faris nia afero plej gravan progreson per parolado de s-o J. Procházka el Opatovice, aranĝita de komercista societo. Pli multe ol 300 personoj aplaŭdis la oratoron! El Svedujo, Francujo, Germanujo kaj Polujo venis salutaj leteroj. En tri kursoj, malfermitaj tuj post tiu ĉi sukcesega triumfo, instruas s-o J. Procházka (marde kaj vendrede) kaj s-o Rud. Faukner (merkrede kaj sabate). En la komerca akademio estos aranĝita baldaŭ esperanta ekspozicio. Multkopiata gazeto „Esperantisto" eliras en Hradec Králové de januaro (duonmonate). La 22-an februaron parolis pri „Esperanto kaj patriotismo" s-o J. Procházka en „Studenta Rondeto": sur tiu ĉi loko ni esprimas sinceran dankon al direktoro de instruista pedagogio sinjoro Josef Vojta, kiu bonvolis montri sian favoron al nia ideo per la permeso aranĝi la paroladon en ĉambro de la instituto. Esperanta oficejo fondita ĉe s-o K. Krupka altiras atenton de ĉiuj preterpasantoj. Gazeto „Ratibor" enhavas dufoje monate longajn artikolojn pri nia lingvo. La rondeto fariĝos baldaŭ grava centro esperanta. Klubo en najbara urbo **Kukleny** turnis al si atenton per bohema parolado de fama esploristo St. Vráz: Epizodoj el mia dudekjara vojaĝado tra la mondo. La 25-an januaron havis la klubo ĝeneralan kunvenon. En proksima urbeto **Praskačka** fondis societon s-o J. Jeřábek, kiu instruas en du kursoj. En la loka preĝejo oni kantis esperante la himnon de Dombrowski kaj „Patro nia". — En **Mladá Boleslav** progresas Esperanto danke kurson malfermitan la 24-an februaron en ĉambro de burĝa lernejo (instruas s-o J. Moucha). La rondeto estis fondita la 12-an januaron post vizito de kelkaj membroj de klubo el Praha. — Klubo „Maja Stelo" en Rokycany, fondita la 29-an oktobron 1907 kunvenadas regule en gastejo „u Lišků". Prezidanto s-o Emanuel Batěk, estis nomita honora membro de teatra societo Máj (kies filio estas la klubo) por la penadoj, kiujn li prenis sur sin, instruante al membroj la kanton kaj Esperanton. — Ĝenerala kunveno de Esperantista grupo en **Č. Budějovice** elektis jenan komitaton: prezid. s-o Fr. Svačina, membroj s-oj Jan Popela, Alois Houska, J. Dítě, Jos. Stejskal. Post la kunsido vizitita preskaŭ de ĉiuj membroj parolis prezidanto s-o Fr. Svačina pri Esperanto en lernejoj kaj pri la akcepto de Dr. Zamenhof en Cambridge. — En **Dvůr Králové** malfermis la 15-an novembron sekretariejo de komercista societo Č. O. B. kurson fonditan kaj kondukatan de s-o Frant. Zlatník, instruisto. Oni esperas, ke la rondeto baldaŭ fariĝos klubo, danke la klopodojn de la nomita societo. S-o Pavlišta, faka instruisto en **Mnichovo Hradiště** faris kelkajn paroladojn en sia urbo kaj en ĉirkaŭaĵo, per kiuj li sukcesis altiri

sufiĉe da intereso al Esperanto. — Kurso farata de s-o Holý, instruisto en **Ousobí**, es'os fermita je fino de marto. — En **Soběslav** apud Tábor laboras nova rondeto esperantista. Sekr. s-o R. Cikhart, instruisto en Radenín. — La klubo de bohemaj Esperantistoj en **Brno**, fondita de malgranda rondeto de laboristaj en la jaro 1901 — do unu el la plej malnovaj kluboj esperantistaj en meza Eŭropo — havis la 16-an de februaro ĝeneralan kunvenon en sia nova klubejo en restoracio „u Jonáků", kaj stariĝis nun sur tute novan fundamenton. Prezidanto estas elektita s-o A. Kroupa, revizoro, vicprezidanto s-o Ant. Tomášek, tajloro, sekretario s-o Jar. Sitko, ĉefkomisario, kasisto s-o J. Rössler, adjunkto, bibliotekisto s-o B. Fikeys, tekn oficisto. La klubo havas ĉiumarde vespere kunvenon en sia klubejo, kie oni de la 7-a ĝis 8-a devas paroli nur esperante; krom tio la klubo arangas duan kurson en la komerca lernejo de prof. Získal. — En **Prostějov** estis malfermita kurso de Esperanto en landa reala lernejo laŭ permeso de direktoro: 50 lernantoj sekvas la instruadon de prof. Rud. Fridrich, kiun elektis la klubo sia konsulo La urbestraro disponebligis ĉambron en la lernejo por kursoj publikaj. En kunveno de instruistoj parolis pri Esperanto s-o Fridrich (70 ĉeestantoj): nova kurso komenciĝos. Esperanta oficejo estas malfermita en Etablissement Sobol. La fremdaj korespondantoj, kiuj rilatas kun membroj de grupo en Prostějov, estas agrable surprizitaj per novaj esperantaj poŝtkartoj, eldonitaj kun kvar diversaj bildoj. — En **Vsetín** parolis pri Esperanto kaj ĝia signifo por bohema nacio s-o Krumphole. S-o K. Kozlovský, kiu sciigas al ni tiun ĉi interesan novajon, esperas, ke rondeto esperantista povos esti fondita, kvankam la paroladon ĉeestis nur 50 personoj. Aliaj grupoj kaj rondetoj, pri kies vigla laboro ni ne povas nun paroli pli detale, ekzistas kaj, estas fondataj en Tábor, Trutnov, Čouš, Minice, Kolín, Kladno, Chotče, Lomnice nad Popelkou, Veselí n. M., Vysoké Mýto, Hostomice, Německý Brod, Opava kaj Liberec (Reichenberg).

Poznámka: Ku zprávě o hnutí Esperanta v Králové Dvoře n. L. v posledním čísle našeho časopisu uveřejněné podotýkáme, že kurs (zahájený místním jednatelstvím Č. O. B.) vede p. Frant. Zlatník, učitel, nikoliv p. L. Petera, jak bylo omylem udáno. Pan L. Petera sděluje s námi, že vydá v nejbližší době propagační plakát, který bude obsahovati hlavně inserce obchodníků; menší část bude věnována Esperantu. Vzhledem k nepatrným poplatkům insertním (5 K za 7 × 10 cm.) bude zajisté možno rozšířiti plakát ve značném počtu. Bližší sdělí p. L. Pettera jor. ve Dvoře Král. — Kroužek Esperantistů v Praskačce u Hradce Králové podnikl na popud sl. Boži Dolanských, člena kroužku, dobrovolnou sbírku mezi členy a přáteli Esperanta ve prospěch „Matice českého domu ve Vítkovicích u Ostravy" a vybráno 140 K, které byly odeslány.

ČEFEČ: KLÍČ A UČEBNICE ESPERANTA PRO ČECHY.

O významu a důležitosti těchto propagačních brošurek bylo pojednáno podrobněji již ve 2. čísle loňského ročníku. Poukázali jsme na fakt, že jest nevyhnutelno, chceme-li zájem někoho k dobré

věci upoutati, dáti mu příležitost, aby sám prakticky se přesvědčil o pravdě našeho tvrzení. Kdykoliv se mluví o Esperantu, vždy naskytne se nám příležitost znovu a znovu přesvědčovati, že k osvojení si znalosti tohoto jazyka netřeba roku, leč týdnů, na nejvýše několika měsíců.

Klíče Esperanta, vydávané ve všech jazycích světa, přesvědčí o tom každého: dejte do ruky komukoliv tuto nepatrnou brošurku a vybídněte jej, aby dle obsaženého slovníku a mluvnice pokusil se přeložiti nějaký text esperantský. Dík jednoduchosti a snadnosti Esperanta, jakož i praktickému uspořádání vysvětlivek, může každý bez přípravy volně překládati. Jest řada způsobů, kterak možno s úspěchem klíčů a učebnic Čefečových*) v akci propagační užíti: při přednáškách o Esperantu, při písemných stycích s cizinou, při zakládání nových kroužku atd. Chceme-li si dopisovati s lidmi různých národností, jichž jazyka neznáme, buď za účelem obchodním nebo vědeckým, buď pro zábavu, můžeme tak lehce učiniti Esperantem: Napišme svůj dopis v Esperantu, vložme do něho klíč Esperanta vydaný v jazyce našeho dopisovatele a tento velice snadno dopis náš přeloží. Nepatrná váha (5 gr.) klíče ničeho na poštovném nemění. Klubům naskytá se příležitost upozorniti na Esperanto vypsáním ceny za nejlepší překlad esperantského článku uveřejněného v místním listě s poukázáním na klíč (jejž zašlou žadatelům zdarma nebo za příslušný obnos zaslaný ve známkách), v němž čtenáři všechny potřebné pokyny naleznou.

Vedle českého klíče vyšla současně česká **učebnice** (10hal.) obsahující kromě mluvnice a slovníku (o 1926 kmenech) překlad známe Andersenovy povídky „Malbela anasido" (Ošklivé káče) „Škaredé mladě" s vysvětlujícími poznámkami.

Jsme jisti, že vydáním těchto propagačních pomůcek bude značně ulehčena práce našich klubů pokud se týče informování o Esperantu použitím prostředků

nejlevnějších a plně vyhovujících.

H a v u i l i n, k o n i g u i l i n, d i s s e n d u i l i n. (*de Beaufront.*)

Redakce našeho časopisu zašle (po předchozím zapravení obnosu ve známkách 5- a 10hal. vyplaceně):

Klíče Esperanta:		Učebnice Esperanta:	
1 ex.	5 hal.	1 ex.	10 hal.
10 ex.	50 hal.	10 ex.	1 kor.
50 ex.	2 kor.	50 ex.	4 kor.

---

*) Čefeč: Herbert Fridrich Höveler — písmena H. F. H. vyslov C. F. C. — autor Klíčů Esperanta a zakladatel „Internacia Propagandejo Esperantista" v Londýně: dosud vydány 5haléřové klíče pro Angličany (E. - Key), Němce (E. - Schlüssel), Francouze (Clef E.), Vlachy (Chiave dell' E.), Švédy (Nyckel till E.), Španěly (Clave E.), Dány (Nögle till E.), Portugalce (Chave do E.), Maďary (E. Kulcs) a Čechy (Klíč E.) Brzy vyjde ruský a polský. Většina z nich vyšla i ve formátu 10hal. učebnice. Všechny jsou tištěny v Londýně.

BIBLIOGRAFIO.

En tiu ĉi jaro ni ricevis jenajn novajn gazetojn:

Rumena Esperantisto (monata), unua perioda publikajo en Rumenujo, eldonita de la Unua Rumena Societo Esperantista en Galatzo. (4 pĝ. 48 × 32.) Jare: 1·20 Sm (3 lei), unu numero 8 sd (20 bani).

La Unuiĝo de l' Bibliofiloj, dumonata internacia gazeto fondita de E. Philippe, Direktoro en Auby (Nord, Francujo) por faciligi al Esperantistoj, laŭ favoraj prezoj, la vendojn, aĉetojn, ŝanĝojn de libroj kaj gazetoj esperantaj aŭ ne, albumoj, kolektoj, ex-libris k. t. p. Numero prova, unua (januaro-februaro ampleksas 8 pĝ. 20 × 27). Jare 1 Sm (2·50 Fr., 2 S, 2 M).

Roma Esperantista, monata oficiala organo de Roma Esperantista Societo „Imperiosa Civitas". Direktoro kaj administranto: prof. Luigi Giambene, Roma 198, Babuino. (8 pĝ. 17 × 25.) Jare 3 Fr. (en eksterlando).

Germana Esperanto-Gazeto. Duonmonata. Magdeburg, Kaiser-Fridrichstr. 1. (12 pĝ. 22 × 28.) Jare 4 M.

Voĉo de Kuracistoj, senpaga monata aldono al duonmonata gazeto „Głos lekarzy". Redaktoro: dr. Stefan Mikołajski. Lwów, ul. Sniadeckich 6. (8 pĝ 20 × 28.)

Estlanda Esperantisto, oficiala monata organo de Revela Esperantista Grupo. Red. & adm.: J. A. Rahamägi. Revel, Weike Kalamaja uul. 7, k. 2. (8 pĝ. 18 × 23.) Jare: 1 rublo (ekster Rusujo: 1 Sm 10 Sd).

Ĉilo Esperantista, organo propaganda de la lingvo internacia Esperanto. Red. & adm. Prof. Ipolito K. Kontreras, Santiago-Chille Casilla 1989. (12 pĝ. 18 × 26.) Jare 2 Fr.

Novaj muzikajoj aperintaj en lastaj monatoj: Himno al Zamenhof, poemo kaj muziko de René Deshays (Paris, Hachette & Cie.: 1 Fr.). Vivu la Reĝ' al ni. God save the king. Angla nacia himno trad. de Dr. L. L. Zamenhof (Paris, Hachette & Cie.; 35 ctm.). Patronia, ĥoro por soprano, aldo, tenoro kaj baso. Teksto kaj kompono de Joh. Gothardo (154-a verko). Kantita la unuan fojon en Cambridge dum la katolika diservo (St. Radegonde, „Espero Katolika"; K 1·50). Nacia Meksika Himno. Himno Nacional Mexicano. Muziko de Jaime Nunó; vortoj de Francisco Gonzáles Bocanegra, esperantigitaj de Ramon Limones. (Mexico, Libreria Internacional, 1a de la Aduana Vieja 4. — Prezo?. Esperanto Marsch of Aug. Etlinger (Kjöbenhavn, Peder Friis, Musigforlag. Prezo?) Valso Esperantista (por fortepiano) de Dario Savedra (Berlin W., Hans Th. Hoffmann, Esperanto-Verlag; 1 M.). La Espero: L. Zamenhof: Esperanta Himno de Woldemar Zaks (28-a verko). Por unu alta kantvoĉo kun fortepiano (1 M). Por unu meza kantvoĉo kun fortepiano (1 M.). Por vira ĥoro part. (40 pf.). Aparta kantvoĉo 20 pf. (Leipzig, Königstr. 6. Karl Rothe). En Songo el Heine. Poezio trad de L. Zamenhof. Muziko de Josée Guivy. (Paris, Presa Esperantista Societo, 33 rue Lacépède: Fr. 1·60). La dumuloj el la Fontaine. Fablo trad. de Vaillant. Muziko de Josée Guivy. (Paris, Presa Esperantista Societo: Fr. 1·60). Esperanto. Valso de A. F. de Ménil (Paris, Hachette & Cie: 60 ctm.. La Kanto de l' Cigno. Traduko de S. Sviridov. Muziko de F. Ménil (Paris, Hachette & Cie.; 1 Fr.). La Vojo. Poemo de Dr. Zamenhof. Muziko de René Deshays. (Paris, Hachette & Cie.: 35 ctm.). La

Espero. Himno Esperantista. Poezio de L. L. Zamenhof. Muziko de F. de Ménil. Por kvarvoĉa miksita ĥoro harmoniigis E. Jelínek (Praskačka u Hr. Kr.; senpage ĉe s-o J. Jeřábek). Všechny jmenované hudebniny zaopatřil též výbor svazu „Bohema Unio Esperantista“, který je zapůjčí interesentům k nahlédnutí. (Adresa: Praha-Karlín 476.)

Centra Oficejo — Paris, 51. rue de Clichy: Baronino de Ménil: Morala edukado de la popola infano. La femme du monde et l' enfant du peuple. (23 pĝ. 16 × 24). Prezo 1 Fr. La duteksta libro estas ornamita per 12 bildoj kaj presita plej elegante. Kun multe da plezuro ni legas la belstilan traktajon pri la someraj kolonioj kaj gardejoj francaj, fonditaj laŭ principoj plej aprobindaj. Vizitintoj de la tria kongreso memoras tre bone la ravigan paroladon de s-ino baronino de Ménil, kiu gajnis tiom da laŭdo. La sama parolado okazis unuan fojon jam en Paris. — La Presse et les Congrès universels d' Esperanto. Kolekto de diverslandaj artikoloj pri la tri esperantaj kongresoj. (12 + 16 + 54 pĝ. 22 × 27.) Prezo Fr. 1·25 Grava por la historio, utila por la propagando kaj por la paroladoj estas tiu ĉi france kaj angle verkita revuo de gazetaj artikoloj aperintaj dum la kongreso. La redaktinto elektis sole gazetojn, kiuj enhavis ĝeneralajn artikolojn pri la kongresoj aŭ Esperanto mem, ĉar plidetalajn priskribojn ĉiu trovas en oficialaj raportoj. Estis ĉerpite el Le Figaro, Le Gaulois, La Liberté, Le Journal, L'Echo de Paris, La Dépêche coloniale, Journal des Debats, L' Humanité, Lyon Republicain, La République française, Le Courrier du Centre, Le Courier européen, Le Boulonnais, The Daily News, Daily Mail, The Daily Telegraph, The Times, The Daily Express, The Standard, The Observer, Daily Graphic, The Tribune, The Nation, Morning Post kaj el 80 Londonaj, Cambridge'aj kaj aliaj anglaj jurnaloj. (La kajero lasta, angla, estas ricevebla por 75 ctm). — Esperantista Dokumentaro: Tria Universala Kongreso de Esperanto en Cambridge, 12—17 de Aŭgusto 1907. (153 pĝ. 16 × 25.) Prezo Fr. 1·25. Detala oficiala protokolaro pri la agadaj kunsidoj, preparo de la kongreso, nomaro de kongresanoj, kunvenoj de specialistoj, diversaj festoj, akceptoj kaj ekskursoj. Ni esperas, ke estus senutile atentigi pri la granda signifo de tiu ĉi eldonajo, kiu cetere devas esti trovebla en biblioteko de ĉiu propagandisto kaj de ĉiu klubo esperantista.

Presa Esperantista Societo — Paris, 33, rue Lacépède:

Louis Bastien: Naŭlingva Etimologia Leksikono de la lingvo Esperanto. (249 pĝ. 11 × 18.) Prezo: 3 Fr. La grava verko enhavas la tutan Radikaron de la Universala Vortaro de dr. Zamenhof kun tradukoj: latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa. Ĝia celo estas: montri la konstitucion de esperanta vortaro, pruvi ĝian internaciecon, helpi la memoron ĉe lernado de radikoj esperantaj kaj doni al instruistoj rimedon por kvietigi scivolemon de lernantoj demandantaj pri deveno de tiu aŭ alia esperanta termino. — Th. Cart: Dictionnaire français-Esperanto et Esperanto-français (kun Radikaro) précédé d' un résumé de la grammaire (24 + 704 pĝ. 9 × 15) Prezo broŝurita: 4 Fr., bindita Fr. 4·50. La vortaro, enhavante 30.000 vortojn, estas hodiaŭ la plej plena verko de sia speco; ĝi estas skizo por la „granda

vortaro" presata nun ankaŭ ĉe P. E. S. kaj aperanta po numeroj. De Grand Dictionnaire Français-Esperanto (20 × 26) eliris jam sep kajeroj (ĝis „bas"); ĝi povas esti abonita por 28 Fr. (aŭ 3-foje po 10 Fr.). Laŭ enhavo de la jam elirintaj 112 paĝoj oni povas juĝi pri la granda valoro de tiu ĉi verko redaktata de multaj kunlaborantoj. — Ranratbatalado. esp. trad. de E. Deligny. (14 pĝ. 11 × 18.) Prezo 40 etm. La amuza greka herokomika verko, skribita de posthomera poeto, bone estas tradukita kaj flue legebla, danke la facilan vortkunmetadon, kiu ludas gravan rolon en la „heroa" rakonto. — Th. Cart: L'Espéranto par la Fable. (9·5 × 14). Prezo 1 Fr. Arta kolekto da 12 poŝtkartoj sur kiuj estas presitaj kvar nelongaj fabloj: La korvo kaj la vulpo. La lupo kaj la ŝafido. La kverko kaj la kano. La muelisto, lia filo kaj la azeno. La frazoj estas akompanataj de franca traduko, klarigoj kaj demandoj. Bela bildeto ornamas ĉiun karton. — En Libraro Pacifisma eliris: No 4. Jarlibro de „Pacifisto". Dua jaro: 31-an de Aŭg. 1907. (48 pĝ. 13·5 × 18·5.) Prezo 50 etm. Modele ordigitaj estas en tiu ĉi libro ĉiuj raportoj koncerne la societon „Pacifisto", kiu havas jam 360 membrojn en 26 landoj. Interesa estas nomaro de 35 societoj pacifistaj, kiuj korespondas ankaŭ en Esperanto. — No 7.: Estonta Milito laŭ la Instruoj de Johano de Bloch. Trad. Royer, Schuck. Alesiano. (120 pĝ. 14 × 19.) Prezo Fr. 1·50. No 8.: Andrew Carnegie: Por Arbitracio. Trad. W. W. Padfield kaj H. Maresquelle. (48 pĝ. 14 × 19.) Prezo 50 etm.

Kolekto „Paco-Libereco" (Internacia Socia Revuo Paris III. Rue de Saintonge 45):

N-o 1. Nova Gvidlibreto por soldato en ĉiuj landoj. Trad. Fi-Blan-Go & Ludoviko. (31 pĝ. 11 × 17.) Prezo 10 etm. — N-o 2. Al la virinoj kaj letero pri la Milito en Hinlando. Trad. Fi-Blan-Go. (15 pĝ. 10 etm.) — N-o 3. Antipatriotismo. El Hervé trad. Fi-Blan-Go & Ludoviko. (32 pĝ. 15 etm.)

Hachette & Cie. — Paris, 79. bd. St.-Germain:

B. Prus - Dr. K. Bein (Kabe): Faraono. Volumoj unua kaj dua. Kolekto de la Revuo. (194 pĝ. 238 pĝ. 15 × 21.) Prezo 2 Fr. + 2 Fr. La traduko de fama pola verko meritas vere pli multe ol citon, kiun ni povas doni pri ĝi en nia kroniko bibliografia; por montri la klarecon de stilo, ĝian riĉecon kaj korektecon, estus bezone represi el tiu ĉi belega verko almenaŭ kelkajn paĝojn, kiuj, bedaŭrinde, ne trovas lokon ĉi tie. Cetere, ambaŭ libroj estas tiel malkaraj komparante ilian enhavon, ke certe ĉiu klubo kaj multaj privataj bibliotekoj baldaŭ ilin posedos mem. — Frederiko Pujula-Valjes: La Rompantoj (kvin monologoj originale verkitaj). Kolekto de la Revuo. (33 pĝ. 15 × 21.) Prezo 1 Fr. — Tristan Bernard-Gaston Moch: Angla Lingvo sen Profesoro. Unuakta Komedio (tradukita el franca lingvo). Kolekto de la Revuo. (44 pĝ. 15 × 21.) Prezo 1 Fr. La lerte tradukita komedio povas esti facile ludata en ĉiuj landoj kun sukceso, se oni sekvas la utilajn konsilojn kiujn la tradukinto aldonis al sia verko memorante, ke ne ĉie oni povus egale facile kompreni la anglan lingvon, uzitan en originalo. — Schiller - Dr. L. L. Zamenhof: La Rabistoj. Dramo en kvin aktoj. Verkaro de Dr. Zamenhof (144 pĝ. 15 × 21.) Prezo 2 Fr. — Alfred E. Wackrill: Konkordanco

de Ekzercaro de Dr. L. L. Zamenhof. Kolekto de la Revuo. (65 pĝ. 11 × 16·5). Prezo 1 Fr. Per eldono de Konkordanco ebligis s-o Wackrill al ĉiuj leganto; de nia netuŝebla fundamento de Esperanto retrovi la senpere uzitan vortan formon de tiu aŭ alia esprimo kaj kompreni tiel pli facile kaj pli bone la leĝon de ĝia uzado. Autoro prezentis per sia libro samtempe modelon al estontaj laborantoj en tiu ĉi fako: estus tre dezirinde, ke ni havu samajn konkordancojn por ĉiuj verkoj de Dr. Zamenhof. — Dr. J. C. O'Connor & D. P. Hugon: Praktikaj, komercaj leteroj (Lettres commerciales pratiques) en Esperanto. (46 + 46 pĝ. 11 × 17.) Prezo 30 ctm. Laŭ eldono angla-esperanta estas verkita franca-esperanta serio da precizaj, praktikaj tekstoj por modelaj komercaj leteroj: kolektinto de tiu ĉi materialo havis longan sperton en la korespondada fako de unu el plej gravaj firmoj en la mondo, kie li havis plej bonan okazon kolekti bezonan materialon por sia libro.

Espero Katolika — Saint Radegonde (Indre-et-Loire) France:

Katolika Preĝaro en kiu troviĝas ĉiuj dimanĉaj diservoj kaj la plimulto de la festoj de l' jaro. Latine kaj esperante. 1-a volumo. Aprobita de Lia Alta Moŝto Mons. Renou, ĉefepiskopo de Tours. (180 pĝ. 9·5 × 15.) Prezo Fr. 2·50. Apero de tiel detala verko estas grava por nia propagando kaj certe ĉiuj katolikaj pastroj ĝin plezure akceptos. Ĝi enhavas preĝojn matenajn, vesperajn, por konfeso, komuniiĝo kaj mesoj: vesprojn, benon de s. sakramento, antifonojn k. t. p. La dua volumo enhavos la diservojn de ĉiuj dimanĉoj kaj festoj. — Katolikaj kunvenoj dum la tria kongreso en Cambridge 1907. (15 pĝ. 14 × 22.) Prezo 25 ctm. Programo de festoj katolikaj okazintaj dum nia lasta kongreso: La diservoj. La papa beno kaj telegrafa respondo. Generala kunveno de katolikoj. Prediko de p-o Richardson. Prediko de p-o Frohns. — Pastro Jakobo Bianchini: Hebrea Kalendaro, kiun uzadis Izraelidoj dum la jarcento de Jesu-Kristo. (16 pĝ. 12·5 × 19.) Prezo 20 ctm. La broŝuro eliras en Moderna Biblioteko sub n-o 1-a de Bibliaj Studoj kaj konigas la kalendaran sistemon de antikvaj Hebreoj. J. Freneuze - Josée Guivy: Per Telefono. (8 pĝ. 11 × 17·5.) Prezo 15 ctm. Traduko de sprita kaj amuza sceneto, kiun oni certe vidos kun plezuro sur la programo de festo esperantista.

Librairie de l' Esperanto - Paris, 15. rue Montmartre:

G. Roy: Etat espérantiste indépendant: projet réalisable en six mois. (21 pĝ. 12 × 17.) Prezo 50 ctm. — Paul Bildhaud - trad. Ferd. Doré: Solo de Fluto. (11 pĝ. 12 × 17.) Prezo 60 ctm. Nelonga monologo ludita de tradukinto unuan fojon dum la kongreso en Boulogne sur Mer kun bona sukceso.

Diversaj: Episkopo de Ely - Rev. J. Cyprian Rust: Ordo de Diservo, laŭ la preĝlibro de la angla eklezio. London W. C. 13. Arundel Str. (30 pĝ. 12 × 18.) Prezo 70 h. — Ch. Dickens - W. Morrison: Bardell kontraŭ Pikwick, proceso eltirita el la romano „Pickwick Papers". London W. C. 13. Arundel Street. (21 pĝ. 12 × 10.) Prezo 70 hel. — Sydney Sprague - William W. Mann: La Historio de l' Bahaja movado. Universala Fido. London, 70. High Street Hampstead. (28 pĝ. 10 × 16.) Prezo 30 hel. — Higgie & Komp. (Rhotesay): Skotlanda pejzaĝo

Scottish scenery. Ilustrita angla-esperanta gvidlibro kun Kondukanto al belega Skotlando. (12 × 19.) Prezo 60 hel. — Esperantista Klubo de San Sebastián: Broŝureto-cirkulero pri fondo de Esperanta Agentejo. Ilustrita gvidlibro. (12 × 15.) — Prof. Couturat: Ĉu unu lingvo internacia aŭ tri? Respondo al prof. Diels. Esperanta traduko de artikolo publikigita en „Deutsche Revue". Berlin. Möller & Borel S. 42. (32 pg 11 — 17.) Prezo 20 pf. La scienca parolado de rektoro Diels en Berlina universitato (3. aŭg. 1906) ricevis bonan respondon: li proponis enkonduki instruadon de franca, angla kaj germana lingvoj en ĉiuj lernejoj de mondo kaj tiel solvi problemon jam solvitan de Zamenhof. (Vidu pĝ. 48. de nia unua jarkolekto). — F-ino Adria Tellini: Kristanaj preĝoj por blindulo j. Prezo 50 etm. Udine, San Rocco, Italujo. (18 pĝ.) Tiun ĉi verkon sekvos baldaŭ aliaj libretoj de rakontoj, fabeloj, humorajoj k. c., tiel ke niaj blindaj amikoj povos plezure mem legi ĉiam pli kaj pli multe da verkoj esperantaj. braille presitaj. — L. Couturat & L. Leau: Les Nouvelles langues internationales, suite a l'histoire de la langue universelle. Paris 5e rue Pierre-Nicole, 7. (pĝ. 110. 14 × 22.) Prezo Fr 2·50. Rimarkinda kolekto de novaj proponoj pri lingvo internacia: interesa por lingvistoj kaj precipe por Esperantistoj, kiuj povas konvinkiĝi pri supereco de Esperanto inter ĉiuj laboroj projektitaj kaj ne uzataj pro ilia negranda valoro praktika.

INFORMEJO. KONSULOJ. ADRESARO.

En gazeto „Pokrok" (Progreso) kaj en revuo „Naše Slovensko" (Nia Slovakujo) aperis serio da praktikaj konsiloj, kiel labori pli sukcese en intereso de subpremataj **hungarlandaj Slovakoj.** Invito, ke la legantoj diskutu pri la proponitaj projektoj, ne restis senresponda: nia konata samideano s-o N. P. Evstifèieff (Genève) sendis longan leteron esperante skribitan al redaktoro de suprenomita revuo, kiu publikigas nun ĝian boheman tradukon: Tre prave klarigas s-o Evstifèieff, ke la eldono de projektita broŝureto informanta estus sensukcesa, kiam ĝi aperus en du aŭ tri vivaj lingvoj; eĉ se ĝi estos senpage disdonata, ĝi ne trovus tiamaniere legantojn, ĉar, kiel konate, multaj firmoj uzas tiun ĉi rimedon por kutimaj komercaj reklamoj. La broŝuro ne devas servi kiel reklamilo, sed kiel rimedo por altiri atenton de tuta civilizita mondo al kruelaj rezultatoj de nacia ŝtata ŝovinismo en Hungarlando, per kiu suferas inter nemagiaraj nacioj precipe Slovakoj — niaj slavaj kunfratoj, loĝantaj en nord-okcidenta Hungarlando. La sola rimedo, kiu povos garantii al senpage ricevebla broŝuro sukceson celatan, estas eldono esperanta. Redakcio de „N. S." plene pravigas argumentojn de s-o Evstifèieff kaj decidiĝis apliki Esperanton por la nomita celo, preferante ĝin pro ĝia internacieco pli multe ol iun ajn el tiel nomataj tutmondaj lingvoj. La redaktadon de nomita broŝuro prizorgos bohema **konsulejo** de Esperantista Klubo en **Praha**, kiu petas, ke ĉiuj el niaj samideanoj povantaj kunhelpi en tradukado de bohema originalo (verkita de red. Reis), sendu tuj sian adreson al s-o Arch. C. C. Nebuška en Praha II. Jenštejnská 4. La broŝuro ne superos amplekson de unu nia numero (16 pĝ 13 × 21). Ju pli multaj kunhelpontoj aliĝos, des pli zorgeme oni povos elverki la libreton.

Esperantista Klubo en Praha nomis sian kvaran **konsulon:** S-on Jaromir Schwarz (adjunkto de bosnia-herceg. ŝtata fervojo) en Sarajevo.

Nova bohema **oficejo esperanta** estas starigita en Hradec Králové (Königgrätz) ĉe s-o K. Krupka, komercisto per ŝtofoj. Informoj pri komerco, turistiko kaj historio. (Batalejo dum milito pruso-aŭstria en jaro 1866).

En Prostějov estis fondita j **oficejo** (Etablissement Sobol) kaj **grupa konsulejo** (prof. Rud. Fridrich, Prostějov, Rejskova ul. 10.). La grupo eldonis serion da kvar kartoj kun bildoj kaj klarigaj tekstoj en Esperanto. Imitinda ekzemplo!

En České Budějovice estas nomita de la grupo s-o Fr. K. Svačina, instruisto (Jirovcova ul. 38) esperanta **konsulo**.

Korespondantoj. *25. S-o Dr. Briquet, *Armentières*, rue National 51. Francujo (Nord). La Grupo kolektas nomojn de ĉiulandoj Esperantistoj, kiuj sin okupas aŭ povas doni esperante sciigojn pri kulturado kaj ŝpinado de lino kaj kotono, komercado kaj teksado de toloj, transportaj elspezoj, limdepago, pagokapableco de klientoj k. t. p. — *26. S-o prof. R. Bernieau, *Eu*, 11. rue de l'Isle. Francujo (Seine Inf.). Serĉas korespondantojn por siaj lernantoj inter bohema studentaro. Tuj respondas. — *27. S-o S. Petrov. *S. Petersburg*, B. Samsonjevski 62. kv. 7. Rusujo. (interŝanĝas poŝtm. kaj dez. kor.). — *28. S-o Iv. Krestanof, sciencamanto. *Pirdop*. Bulgarujo (il k.: ĉiam tuj resp.) — *29. J. F. Havelka, akademiano. *Leipzig*. Wächterstr. 11. Germanujo. Dez. kor. pri arto per il. k. aŭ leteroj). — *30. S-o Josif Fadeeviĉ Asaturov. *Tiflis*. 2r Tumanovskaja ul. 38 Kaŭkazo. Rusujo. (dez. kor. kun ĉiulandaj samideanoj per il k. kaj leteroj). — *31. S-o F. Jammes. sekr. de Grupo Esp. en *Le Puy*, rue Lafayette (France) dez. il. k. por la ekspozicio. — *32. S-o T. Ounapuu, *Revel*, Luizentala str. 28. Rusujo (il. k. let.). — *33. S-o Alb. Humez, *Douai*, 13 b. rue Morel. Francujo Nord (p. k. kaj l.). — *34. S-o P. Pascual. *Barcelona*, 45. via Massague, Sabadell (il. k.). — *35. Esperanta Informejo por Junuloj en *Graz* (Aŭstrio), Landhausgasse 3 III. (Donas al junuloj informojn pri esp. movado, gazetaro, literaturo, interŝanĝo de p. k. kaj leteroj: kolektas adresojn por reciproka korespondado. Nomaro de fremdaj korespondantoj, monate eldonata, estas senpage sendata al membroj de la unuiĝo. Jare K 1·20. Petu detalajojn.) — *36. S-o Alfred Siebenschein, sekr. de akad. societo esper. en *Wien* IV. 2. Alleeg. 58. I. (dez. kor. kun bohemaj stud.) — *37. S-o Leo Jalava, *Abo* (Turku) Arseninkatu 14 b. *Finnlando* (dez. kor. pri io ajn).

Nia literatura konkurso. Tekston por la propaganda flugfolio sendis ankaŭ s-o Koberle Karel el Praha.

„**Głos Lekarzy**" (Voĉo de kuracistoj), dusemajna pola organo por aferoj profesiaj de la kuracistoj, por etiko kuracista kaj sociala medicino, eliranta en Lwów, malfermas prove, komencante de marto 1908, esperantan fakon por internacia korespondado de kuracistoj kaj invitas ĉiunaciajn kuracistojn al la partopreno. Ĉiuj korespondantoj ricevados senpage la represajon. Por reguligi nombron de la eldono, oni petas baldaŭan anoncon pri sia partopreno. Sin turni al: Dr. Stefan Mikołajski, Lwów, ul. Śniadeckich 6.

Al ĉiuj niaj abonintoj ni sendas kun tiu ĉi numero la malgrandan ŝlosilon de Esperanto kaj la cirkuleran leteron de Dr. Zamenhof.

ČTĚTE ČLÁNEK NA STRÁNCE 41.

PŘEDPLATNÉ NA ROK 1908: 3 KORUNY.

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de K. Pitter, Praha.